Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 54 - trimonata
2024/3

IPR

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:
József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Ladislau Afonso
Aristóphio A. Alves Filho
Marija Belošević
Emmanuel Desbriéres
Ariadna Garcia Gutiérrez
Mireille Grosjean
Ilona Koutny
Aranka Laslo
Stefan MacGill
Alessandra Madella
Hassano Ntahonsigaye
Miora Raveloharison
Ahmad Reza Mamduhi



ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) 3
Aristóphio A. ALVES FILHO: *Raporto pri la 57-a ILEI-Kongreso* 4
Ariadna GARCÍA GUTIÉRREZ: *Esperantaj radioelsendoj kiel efikaj lerniloj* 13
Manĝetiketa Seminario (Alessandra MADELLA) 14
Mireille GROSJEAN: *UK 2024 Arusha Malfermo - Salutparolo nome de ILEI*..... 15
„La Tago de Lernado" / Komitatkunsido de UEA (Marija BELOŜEVIĈ) 16
Ilona KOUTNY: *Unika eksperimento finiĝas per bonaj rezultoj en AMU*..... 20
Ladislau AFONSO: *La apo LearningApps por Esperantaj didaktikaj ludoj* 23
El la landoj kaj sekcioj (CN, BI, FR, RS, TZ)..... 28
AMO-seminario ĝis la fino de 2024 (Stefan MACGILL) 34
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj 37

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh.Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <*mamduhi@gmail.com*>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <*lena_espero@mail.ru*>. Lerneja agado.

Estrarano pri financoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. *ilei.kasisto@gmail.com* (financoj). Tel.+374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <*karinko_arm@mail.ru*>. Ekzamenoj.

Vic-prezidanto: Alessandra MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italio, Tel. +39 0521 785582, <*a.madella@tiscali.it*>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.

Estrarano pri kongresoj: Laura BRAZZABENI, via San Filippo 52, IT-58031 Arcidosso (GR), Italio. <*laura.brazzabeni@gmail.com*>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Lerneja agado.

Estrarano: Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <*mjerkovic@net.hr*>. Lerneja kaj landa agadoj.

Estrarano: Fernando PITA, R. S. Francisco Xavier, 681, bl E, ap 201, Maracanã - cep: 20550-011, Rio-de-Ĵanejro, Brazilo. <*magisterpita@gmail.com*>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram, WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj, observanto ĉe TEJO.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <*radojica.petrovic.rs@gmail.com*>. Tel. +381 64 8525321 (Viber, WhatsApp, Telegram). Eduk-projektoj, universitata agado, instrukapabligado.

Estrarano: Aime Patrick MANIRAIZA, Buhomba 7 Nr 39,Maramvya, Bujumbura, Burundo, Tel. +25779813485 (Whatsapp, Telegramo), <*apmanirakiza@gmail.com*>. Agado pri Afriko.

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford; AdE[1]

***Membroj*:**

Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza"; AdE[1]

Probal Dasgupta, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE[1]

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE[1]

Ilona Koutny, Pollando/ Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu

Stefan MacGill, Nov-Zelando/ Hungario

Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE[1]

Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

[1] AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo: Patrick MANIRAKIZA, nia nova estrarano, prelegas en La Tago de Lernado dum UK. (vd. p. 16)

Dorskovrile: Unika eksperimento finiĝas per bonaj rezultoj en AMU (vd. p. 20)

Enkonduko

Karaj legantoj,

Ankaŭ tiu ĉi revunumero brile spegulas la viglecon kaj engaĝiĝon de nia tutmonda komunumo.

La ĉi-jara ILEI-Kongreso en Brazilo estis historia evento, kiu sukcese okazis hibride. Ĝi kunigis partoprenantojn el diversaj kontinentoj, montrante la veran internaciecon de nia movado. La kongresa ĉeftemo estis ege grava kaj valida: „Esperanto por justa edukado".

La Rezolucio de la Kongreso substrekas nian engaĝiĝon al kvalita edukado kaj la graveco de lingva diverseco. Ni daŭre laboras por plifortigi niajn rilatojn kun Unesko precipe ĉi-jare kiam la montevidea rezolucio fariĝos 70-jara la 10-an de decembro.

La prezentata apo por fari ludojn helpas ankaŭ por instrui Esperanton en la cifereca epoko. Ni ĝojas raporti ankaŭ pri la sukcesa kaj daŭra laboro por integri Esperanton en universitatojn.

Aparte inspira kaj esperiga estas la raporto pri la infanoj ĉe la Esperanto-Muzeo en Ĉinio. Ilia entuziasmo kaj lernemo estas potenca memorigo pri la graveco de la nova generacio por nia movado. Ĉi tiuj junaj lernantoj ne nur reprezentas la estontecon de Esperanto, sed montras ankaŭ la daŭran validecon kaj aktualecon de nia lingvo en la moderna mondo.

Mi esperas, ke ĉi tiu numero instigos vin daŭrigi vian valoregan laboron kaj entuziasmigi aliajn pri la beleco kaj utileco de Esperanto.

Ahmad Reza MAMDUHI

RAPORTO PRI LA 57-a ILEI-KONGRESO

de Aristóphio A. ALVES FILHO (Brazilo)

La 57-a ILEI-kongreso, kies ĉeftemo estis „Esperanto por justa Edukado”, okazis en Maceió, Brazilo, de la 20-a ĝis la 27-a de julio 2024. Dum la kongreso, instruistoj, lernantoj kaj aliaj esperantistoj el diversaj fakoj kunsidis en la privata Universitato CESMAC aŭ sidis hejme kaj partoprenis rete per Zoomo. La kongreso celis prelegojn kaj debatojn pri la rolo de Esperanto en edukado kaj kiel ĝi povas kontribui al pli justa kaj inkluziviga instruado en la mondo.



Ĝi estis organizita de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kune kun la brazila sekcio de ILEI, kiu havis apogon de esperantistoj el pluraj brazilaj urboj kaj el aliaj landoj. La kongresa komitato konsistis el 9 homoj: Laura Brazzabeni (komisiito pri kongresoj), Karine Arakeljan (ILEI-kasistino), Fernando Pita (komisiito pri Simpozioj) kaj 6 lokanoj sub la kunordigo de Aristophio Alves Filho (brazila sekciestro). Kaj nia sponsoro estis la vic-rektoro de CESMAC, kiu disponigis al ni tute senpage bone ekipitan aŭditorion de tiu universitato kaj helpon de 4 laboristoj, kiuj dum la semanjo kunlaboris kun ni.

La kongreso estis hibrida evento kaj arigis 84 partoprenantojn el 27 landoj. Entute okazis 23 prelegoj, 2 atelieroj, 6 koncertoj, 2 komitatkunsidoj, 1 seminario kaj 11 prelegoj de profesoroj dum la Simpozio.

La 20-an de julio okazis la disdono de la kongresaj sakoj, identigiloj, mapoj de la urbo kaj aliaj aĵoj. La tago finiĝis per la Interkona Frandvespero, kiam la kongresanoj babilis libere kaj interkonatiĝis dum ili gustumis tipajn

frandaĵojn kiel tapioko, maizkuko, manioka kuko, dolĉaĵo, suko, teo kaj kafo.



La 21-an de julio okazis la Malfermo. La argentina kantisto Alejandro Cossavella ludis belajn kantojn. Komence Laura Brazzabeni ekigis la ceremonion, salutis ĉiujn kaj invitis la prezidanton Ahmad Reza Mamduhi, kiu salutis la kongresanojn, prelegis pri la temo: „Esperanto por justa edukado" kaj malfermis la kongreson. Poste, Laura invitis aliajn homojn fari siajn salutadojn, inter ili, min kiel prezidanton de LKK, nome de la lokaj organizantoj de la 57-a kongreso, kaj Ariadna García, nome de Kuba Esperanto-Asocio. Post tio okazis omaĝo, pere de dokumenta filmo, al la esperantista pastro Teófanes Augusto de Barros, memstara lernanto de Esperanto kaj apoganto de nia surloka movado de antaŭ 53-jaroj, ekde la fondiĝo de nia Alogoasa Asocio (AAE). Li estis edukisto kaj fondinto de la universitato, kiu gastigis nian kongreson en la sama loko, kie okazis en 2004 la 39-a Brazila kongreso de Esperanto. Poste okazis paŭza momento, kiam Cícero Oliveira ludis du muzikpecojn. Fine oni kantis la himnon „La Espero".

La posttagmezo kaj vespero estis por libera promenado sur la marbordo de Maceió, ĉe la plaĝo Ponta Verde, kie multaj urbanoj kaj turistoj pasigas horojn piedirante, aliaj biciklas, rulsketas, banas sin, sunbruniĝas aŭ simple sidas en manĝejoj kaj babilas, dum ili manĝas kaj iom trinkas. Alia libera

momento por la homoj konatiĝi kun la loĝantoj kaj iom ĝui la lokan kulturon estis dum merkredo, la 24-a de julio, dediĉita al ekskursoj kaj sen programeroj en la kongresejo. Ĉiuj estis liberaj por promeni en la urbo, viziti muzeojn, galeriojn aŭ iri al aliaj najbaraj urboj.

La 22-an matene okazis la komitatkunsido de ILEI. Oni debatis pri la agadoj de ILEI, aprobis la buĝeton kaj laborplanon de la Ligo kaj prenis aliajn decidojn por la venontaj jaroj. Aŭrora Bute, kunordiganto de la elekta komisiono, gvidis la elektadon de la estraro de ILEI. Posttagmeze okazis kelkaj programeroj, inter ili, prelego de James Rezende Piton pri „Konkurintoj de Esperanto en la tempo-maŝino"; Ariadna García Gutiérrez el Kubo parolis pri siaj spertoj en instruado de la hispana lingvo en Kubo; Fábio Roberto informis pri la libreto „Amiketo", bunta gramatiko por infanoj kaj plenkreskuloj, kiuj neniam lernis la lingvon; Cícero Soares raportis pri „Indukta metodo - skizo de eksperimentado"; kaj Willian Gomes gvidis tre interesan paroligan sesion ĉirkaŭ la temo: „Tra la kosmo". Nacia vespero regalis la homojn per tri prezentoj: la unua estis de la aktoro Chico de Assis, kiu deklamis en la portugala lingvo kaj eĉ kantis fine de sia prezento. La dua estis de la kantisto Kall Silver, akompanata de sia nevo, kiu kantis muzikojn pri la urbo, kaj laste Teka Ramos, kiu kantis brazilajn muzikojn elektitajn el la retejo „Brazila kolekto". Vidiĝis surekranaj prezentoj de tradukoj de poemoj kaj muzikoj.

Mardon, la 23-an, oni komencis per la brila prezento de Ursula Grattapaglia pri la 50-jara agado en la „Bieno-Lernejo Bona Espero". En alia tago, ŝi parolis pri Rotari-Klubo en Esperanto. Poste estis la vico de Alessandra Madella, kunordiganto de Virina Agado, en la Seminario pri „Interkultura Komunikado - Manĝetiketo" kun komentoj, inter aliaj de Gong Xiaofeng (Arko). Multaj prelegoj, atelieroj, koncertoj, kvizo okazis en la sama tago kaj ĵaŭde. La vesperon de tiu sama tago okazis mirinda koncerto de Alejandro Cossavella, kiu kantis originalajn kaj tradukitajn kantojn.

Fábio Roberto prezentis alian libreton, nome: „La sekreta pordego". Temas pri portugallingva historieto, en kiu knabino survoje trovas pordegon sekretan. Malantaŭ tiu pordego troviĝas geknaboj, kiuj parolas Esperanton. La libro estis eldonita danke al la leĝo „Paulo Gustavo" por instigo al kulturaj agadoj en Brazilo.

Ariadna García prelegis pri „Radio Havano Kubo en Esperanto" kaj montris kiel la diversaj kulturoj afrika, araba, ĉina kaj hispana influis la kuban gastronomion. Tiel ŝi kontribuis al la programo de „Virina Agado"

dum la kongreso. Ŝi ankaŭ kaptis liberan momenton por prezenti la kuban agadon kaj inviti la homojn partopreni venontjare en la kuba kongreso. Grandan kontribuon ŝi faris al la ILEI-kongreso intervjuante la kongresanojn kaj raportante al Radio Havano.


Lívio Oliveira prezentis du projektojn: unu estis „La cifereca biblioteko”, por bitigo de libroj kaj aliaj Esperantaj verkoj. La alia temas pri „Esperanto-mapo” kaj celas montri al la mondo per Google-maps la Esperantajn asociojn, grupojn kaj aliajn organizojn de Esperantujo. La du projektoj havas partnerojn: ili estas brazila Esperanto-Ligo, Kuba Esperanto-Asocio kaj Fondaĵo Sistemika.



Willian Gomes prezentis la faman kaj gravan, ne nur por brazilanoj, projekton „Programo Mia Amiko” de Adonis Saliba, la komunumon kaj la novan kurson „Ekflugo”, gvidotan de li. Cícero Carlos gvidis du bonegajn atelierojn: unu pri la „Brajla skribosistemo por Esperanto” kaj alian pri „Origamio” kun modeloj rilatantaj al la brazila kulturo, specife pri Masejoo [*vd. la foton supre*]. Marton Paulo faris interesan kvizon, kies temo estis: „Similecoj inter Esperanto kaj aliaj lingvoj”. Li komparis la vortprovizon de Esperanto kun diversaj lingvoj per interaga ludo. Per „Didaktikaj ludoj per LearningApps” Ladislau Afonso instruis nin uzi tiun apon por prepari

diversspecajn ludojn cele lernigi la lingvon kaj iel diskonigi ĝin. Nia samideanino Tatjana Loskutova, kiu havas longan sperton en instruado de Esperanto ne nur en Rusio sed ankaŭ en aliaj landoj, prelegis pri „Defioj kaj perspektivoj de Esperanto-instruado eksterlande”. Laura Brazzabeni, instruistino de la angla kaj Esperanto en Italio, pritraktis la temon „La defioj de la angla kaj la ŝancoj de Esperanto por italaj studentoj”. Kaj fine, Álvaro Borges priparolis la agadojn de esperantistoj por diskonigi la lingvon internacian dum gravega evento en Rio de Ĵanejro, nome: Bienalo de Rio. Li montris fotojn de la pasintjara bienalo kaj invitis ĉiujn aliĝi al la venonta, en 2025, kiam Rio ricevos de UNESKO la titolon: „Internacia ĉefurbo de libro”.

La 26-an de julio okazis Simpozio, kiam profesoroj kaj eksprofesoroj de pluraj universitatoj tra la mondo prelegis pri la temo „Lingvoj de instruado kaj justa edukado”. Malfermis kaj gvidis la Simpozion Fernando Pita, kiun sekvis Alessandra Madella per prezento de la „Simpoziaj Aktoj de ILEI-2022/2023”. Poste Ilona Koutny prelegis pri „Profesoro István Szerdahelyi, ĝisosta pedagogo, okaze de la 100-jara jubileo”. Ŝi parolis, inter aliaj aferoj, pri lia granda kontribuo al Esperanto en Hungario kaj tutmonde [*vd. la foton malsupre*].



La vic-rektoro de CESMAC, Douglas Apratto, kiu de tempo al tempo vizitis nin, alvenis ĝuste ankaŭ dum Ilona prelegis. Li sidis apude kaj demandis pri ĉiuj esperantistoj kaj ĉeestaj kaj virtualaj, kiuj aperis surekrane. Li dankis kaj ne sukcesis malkaŝi sian kontentecon vidi, ke en lia universitato

okazas internacia evento kun partopreno de homoj el pluraj landoj, kiuj ne havas lingvan baron.

Pri „Miksita metodo por la esploro pri la lingva justeco en la eduksistemo” prelegis Vicente Manzano-Arrondo (Viko). Post li, Nina Danylyuk prezentis „La ukraina lingvo por la instruado kaj edukado en Ukrainio”. Flavio Fonseca kaj Eduardo Nadalin, kun tradukoj de Ivan Colling, prezentis portugallingve, respektive, la temojn: „Lingvo en dialogo, justa edukado en la lingvo-instruado” kaj „Lingvo kaj identeco: la vojirado de la pola en UFPR”. Fábio Roberto raportis pri „Kreado de didaktikaj kaj malmultekostaj instruiloj”. Kaj en alia momento li raportis pri la agado de „Esperanta-ambasadejo en Pouzo Alegre”, kiu danke al apogo de la urbestro fariĝas la brazila Esperanto-urbo. Sekvis prelegoj de Mireille Grosjean, kies temo estis: „Per kiu lingvo afrikaj infanoj lernu legi kaj skribi” kaj de Ivan Colling pri „Lingva diverseco en Brazilo; kunoficialigo de lingvoj, plurlingveco kaj defioj en edukado.”

Fermis la Simpozian tagon la muzika prelego fare de Flávio Fonseca „Muziko kaj Edukado”, kiam li per muzikaĵoj klarigis la trajtojn kaj utilon de brazilaj kantoj tradukitaj al Esperanto en la retejo „Brazila kolekto” por la edukado. Post tiu momento, ĉar multaj prelegintoj jam estis vojaĝontaj, ni kiel danko al la kontribuintoj (almenaŭ al tiuj, kiuj ĉeestis), donacis ion por memorigi ilian partoprenon en nia ILEI-kongreso, kaj dankis pro la grandega kontribuo de ĉiuj.

Ĉar la Simpozio okazis en la 26-a de julio, nia arta vespero estis festo por omaĝi la 137-jariĝon de Esperanto per Esperanto-Kuko. Ni regalis per salaĵoj kaj trinkaĵoj la ĉeestantojn, kiuj kantis gratulkanton en la lingvo de doktoro Zamenhof kaj dancis gaje. Kelkaj partoprenantoj post tio jam devis adiaŭi nin.

La lasta tago estis la Ferma Ceremonio. Inter aliaj aferoj okazis la prezento de la elektita estraro, legado de la Rezolucio de la kongreso, prezento de la kongresurbo de la venontjara kongreso fare de Radojica Petroviĉ kaj simbola transdono de la flago al la LKK de la 58-a ILEI-kongreso en Beogrado (Serbio). Fine, dankoj de Ahmad, Laura kaj aliaj al ĉiuj partoprenintoj kaj kontribuintoj al la sukceso de nia 57-a ILEI-kongreso. Douglas Apratto longe salutis la kongresanojn kaj gratulis la organizintojn. Krome, li promesis diskonigi Esperanton en la universitato, venontjare, per prelego en la plej granda aŭditorio de CESMAC, en la Kultura Centro João Sampaio.

La kongreso estis okazo diskonigi Esperanton tra la urbo kaj ni montris al la brazila esperantistaro la rolon de ILEI. La unuafojaj kongresanoj konstatis, ke ILEI-kongreso estas evento ne nur por instruistoj, sed ankaŭ por ĉiuj esperantistoj kaj interesiĝantoj pri la lingvo internacia. Ili rimarkis, ke ne nur prelegoj pri instruaj metodoj kaj teknikoj troviĝas en ILEI-kongresoj, sed ankaŭ alitemaj prelegoj, atelieroj, kvizoj, koncertoj kaj aliaj programeroj allogaj kaj distraj. Kiel rikolton de nia semado ni rajtas citi: la entuziasmon de la partoprenintoj, kiuj jam planas partopreni en la venonta ILEI-kongreso en Beogrado/Serbio kaj kompreneble ankaŭ en la UK en Brno/Ĉeĥio, la apogon de la vic-rektoro de CESMAC por diskonigi Esperanton al siaj studentoj kaj la revigligon de la loka asocio, kiu post la pandemio lamis.

Al ĉiuj kontribuintoj al la sukceso de nia kongreso, diversspecaj kunlaborintoj, la ILEI-estraro, LKK-anoj de nia loka asocio kaj niaj familianoj iras niaj specialaj dankoj. Sed meritas apartan dankon Deraldo Oliveira, neesperantisto, kiu aliĝis al la kongresa komitato kaj bone estris la teknikan parton de nia kongreso, helpe de James Piton, al kiu mi dankas ankaŭ pro la tradukoj, revizioj kaj eldono de la kongresaj poŝtmarkoj. Ankaŭ al Ciro Gomes iras nia danko, ĉar li filmis la tutan kongreson kaj alŝutis multajn fotojn al la grupo. Ni esperas revidi ĉiujn en Beogrado.

Rezolucio de la 57a ILEI-Kongreso

La partoprenantoj de la 57a Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), okazanta hibride – ĉeeste en Maceió, Brazilo, kun 27 partoprenantoj, kaj virtuale kun 57 partoprenantoj el 27 landoj tra la mondo - de la 22a ĝis la 27a de julio 2024, kun la ĉeftemo „Esperanto por justa edukado”,

KONSCIANTE pri la fundamenta rolo de edukado en konstruado de pli justa kaj pli paca estonteco, kaj rekonante la gravecon de promocio de interkulturaj komunikado kaj interkompreno inter popoloj,

KONSIDERANTE, ke:

- Esperanto, kiel neŭtrala kaj facile lernebla lingvo, prezentas valoran ilon por superi lingvajn barojn kaj antaŭenigi internacian kunlaboron;

- Instruado de Esperanto povas riĉigi la edukajn spertojn de studentoj, evoluigante iliajn lingvajn, interkulturajn kaj kognajn kapablojn;

- La alpreno de Esperanto kiel komuna interlingvo en internaciaj kuntekstoj povas helpi redukti kostojn kaj plibonigi la efikecon de komunikado;

KONSTATAS kun granda kontento la sukceson de la nuna ILEI-Kongreso, kiu ebligis la partoprenon kaj interagon de 84 personoj el 27 diversaj landoj;

ESPRIMAS sian profundan dankon al:

- CESMAC (Centro pri Superaj Studoj de Masejoo) kaj ĝia vicrektoro, d-ro Douglas Apratto Tenório, pro la malavara kaj varma gastigado de la kongreso;

- Prof. Laura Brazzabeni kaj la Loka Kongresa Komitato, precipe s-ro Aristophio Andrade Alves Filho, pro la sindediĉa laboro en la organizado de ĉi tiu unika evento;

- La urbo Maceió pro la gastama bonvenigo kaj subteno;

SUBTENAS la gravecon de la ĉeftemo „Esperanto por justa edukado" kaj REKONAS la valorajn kontribuojn kaj diskutojn okazintajn dum la kongreso pri tiu ĉi temo;

GRATULAS la sukceson de la ILEI-Simpozio, okazinta la 26an de julio 2024, koincide kun la Internacia Tago de Esperanto, kun la temo „Lingvoj de Instruado kaj Justa Edukado";

DANKAS profesoron Fernando Pita pro lia elstara laboro en la organizado de la Simpozio;

BONVENIGAS la kontribuon de la nova Virina Komisiono de UEA, kiu ĉi-jare transprenis la jam tradician organizadon de la „Virina Agado" dum la kongresoj de ILEI, substrekante la temon „Interkultura Komunikado" ankaŭ el la virina vidpunkto per „Seminario pri Manĝ-etiketo" kaj aliaj valoraj kontribuoj dum la nuna Kongreso;

DANKAS profesorinon Alessandra Madella pro ŝia modela laboro en la organizado de la Seminario;

REKOMENDAS:

1. Promocii la instruadon de Esperanto en lernejoj de ĉiuj niveloj, plifortigante ĝian rolon en la edukado de civitanoj de la mondo;

2. Instigi edukajn instituciojn inkluzivigi Esperanton en siaj studplanoj kaj organizi ankaŭ eksterlernejajn agadojn dediĉitajn al la studo kaj disvastigo de la lingvo;

3. Subteni esploradon en la kampo de Esperanto-instruado kaj la produktadon de novigaj kaj bonkvalitaj instrumaterialoj;

4. Kunlabori kun Esperanto-asocioj kaj internaciaj organizoj por antaŭenigi la uzadon de Esperanto en edukaj kaj kulturaj kampoj;

5. Alparoli la Edukministeriojn de diversaj landoj por rekoni la gravecon de Esperanto kaj alpreni konkretajn agadojn por instigi ĝian disvastiĝon;

INVITAS:

- Ĉiujn instruistojn integri Esperanton en siajn instruajn agadojn, uzante disponeblajn rimedojn kaj partoprenante en internaciaj kunlaboraj projektoj;

- Familiojn subteni la lernadon de Esperanto de siaj infanoj, rekonante ĝiajn efikajn kaj longdaŭrajn avantaĝojn;

- Internaciajn instituciojn antaŭenigi la uzadon de Esperanto kiel laborlingvon kaj subteni iniciatojn celantajn disvastigi Esperanton kaj ĝian kulturon;

REEMFAZAS la engaĝiĝon de ILEI al la promocio de Esperanto kiel ilo por justa kaj egaleca edukado tutmonde;

ALVOKAS ĉiujn partoprenantojn kaj ILEI-membrojn daŭrigi la laboron por antaŭenigi la celojn kaj idealojn diskutitajn dum la kongreso en siaj respektivaj komunumoj kaj edukaj medioj;

KONKLUDAS, ke la instruado de Esperanto povas kontribui al konstruado de pli justa, egaleca, paca kaj helpema mondo, en kiu lingvaj diferencoj ne plu estos malhelpo al interkompreniĝo kaj internacia kunlaboro – sed nur kulturaj trezoroj, kiujn la komuna uzo de Esperanto alirebligos por ĉiuj.

Akceptita en Maceió, Brazilo, la 27-an de julio 2024.

Esperantaj radioelsendoj kiel efikaj lerniloj

de Ariadna GARCÍA GUTIÉRREZ
Estrarano pri Informado de Kuba Esperanto-Asocio

Dum la ĉi-jara ILEI-kongreso, mi havis la eblon partopreni ĉeeste kaj prezenti kelkajn temojn, kiujn mi konsideris interesaj por la partoprenantoj. Ĉiuj tiuj temoj rilatas al mia agado kiel aktivulino kaj estrarano de Kuba Esperanto-Asocio (KEA) kaj ankaŭ rilate al mia profesio de instruistino de la hispana kiel fremda lingvo kaj kiel Esperanto helpis min tiusence.



Lige al mia agado en KEA, mi prelegis pri Radio Havano Kubo en Esperanto, kie mi estas profesia parolistino kaj kelkfoje ankaŭ redaktas pri temoj rilate al la kuba movado aŭ intervjuas kaj raportas dum kongresoj. Tion mi faras kiel konstantan agadon de antaŭ 20 jaroj, unue amatorece, poste profesie, krom kunordigo de informagadoj en landaj komunikiloj.

Mi forte kredas, ke la kubaj Esperantaj radioelsendoj estas grava ilo por pli bone lerni Esperanton kaj praktiki ĝin ofte pro la fakto, ke ili aŭskulteblas unufoje ĉiusemajne, kaj ekkoni pli pri Kubo, ĝia kulturo kaj la Esperanto-

movado. La elsendoj estas bona ekzerco por praktiki aŭskult-komprenan kapablon.

Por mi tio estis kaj estas tuttaga lernejo, kie oni povas alfronti defiojn, lerni de ili kaj fariĝi pli profesia. Unu el tiuj defioj estis, kiam komenciĝis la pandemio en 2019 kaj fariĝis tre malfacile iri al la radiostacio. Do, ni devis ekpensi kiel havi altan sonkvaliton laborante hejme. La sonteknikisto de Radio Havano Kubo en Esperanto, Alejandro Garcia, klarigis, ke ni devus sonregistri en fermitaj lokoj sen eĥoj por sukcesi. La nuraj lokoj hejme kun tia priskribo estas la ŝrankoj pro la fakto, ke ankaŭ la vestaĵoj multe helpas tiusence. Dank' al tio ni havis bonan sonkvaliton kaj ne haltigis niajn ĉiusemajnajn radioelsendojn.

Ni ĝojas, ke post 36 seninterrompaj jaroj de elsendado en Esperanto, niaj fidelaj aŭskultantoj alte aprezas nian laboron kaj sendas mesaĝojn al radiohc@enet.cu por sciigi nin pri tio kaj pri la landoj kaj regionoj, kie ili aŭskultas nin. Tio ebligas al ni havi statistikojn pri la influo de nia laboro kaj kiel gravas, ke publika radiostacio de iu lando uzas Esperanton kiel laborlingvo en tute samaj kondiĉoj kiel la aliaj por diskonigi sian voĉon al la mondo.

Ankaŭ al ĉiuj kontribuantoj ni tutkore dankas pro iliaj interesaj kontribuoj kaj ilia volontula dispono kunlabori kun ni.

Mi profitas la okazon por inviti vin sekvi nian programon ĉe la retejo de Radio Havano Kubo www.radiohc.cu/eo.

Manĝetiketa Seminario

Alessandra MADELLA (Italio)

Dum la ĉi-jara ILEI-kongreso okazis ankaŭ la Seminario pri „Interkultura Komunikado: Manĝetiketo", gvidata de Alessandra Madella kun la helpo de Gong Xiaofeng (Arko), kiu malfermis ĝin kun enkonduka prelego pri diversaj ĉinaj manĝ-manieroj kaj -tabuoj. La ideo pri la Seminario venis de kurso pri Interkultura Komunikado, kiun Alessandra regule instruas en Ĉinio ĉe la Universitato de Zaozhuang. La temo estis specife petita de pasint-semestraj gestudentoj, kiuj venis plejmulte el la tre rit-konscia Shandong-provinco, la iama hejmloko de Konfuceo. Sed ĝi tuj ŝajnis taŭgi ankaŭ por la kongreso de ILEI, pro ĝia fokuso pri komparo de

kutimoj kaj interkultura komunikado. Fakte, manĝi estas la plej natura bezono, komuna al ĉiuj homoj. Sed ĝi estas ankaŭ fundamenta parto de kulturo, ĉar diversaj manĝmanieroj difinas la identecon de apartaj homaj grupoj. Mi do baziĝis sur la sukcesa libro de Margaret Visser, instruistino pri la greka kaj la latina en kanada universitato, por montri kiel niaj manĝo-ritoj gvidas nian vivon kaj estas grava parto de interkultura komunikado. De la sinsekvo de eblaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj en itala picejo, tra la ĝusta maniero manĝi spagetojn, ĝis la vido al fromaĝo en malsamaj kulturoj, ni trairis interesan kaj bongustan pejzaĝon, kiun la brazila publiko multe aprecis, kiel estrarano Fernando Pita korekte antaŭvidis.

Historie, facile montreblas, ke virinoj havis ofte pli da povo, kiam manĝetiketo plej gravis, ĉar la virina ĝentileco venkis super la vira korpa forto. Muta naturo estis arta genro, en kiu multis pentristinoj, kaj same multis la inaj aŭtoroj de fabeloj kiel *Belulino kaj la Besto*, en kiuj povaj feinoj gvidas siajn protektatinojn al sukceso, instruante al ili gravajn etiketajn kaj kondutajn konojn. Pro tio, la Seminario pri manĝetiketo estis ankaŭ parto de „Virina Agado" kaj taŭge malfermis ĝin Arko kiel la estrino de la nove restarigita Komisiono de „Virina Agado" ĉe UEA.

UK 2024 Arusha Malfermo
Salutparolo de Mireille Grosjean nome de ILEI

Saluton al ĉiuj!

Mi ne membras en la Estraro de ILEI. Mi estis prezidanto de ILEI dum ok jaroj. Nun ne plu. Mi ĝojas anonci al vi nun, ke estas nova kapabla estrarano de ILEI el Afriko, Patrik Manirakiza, sekciestro de Burundo kaj kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA, kiu zorgos precipe pri Afrika Agado. Sed la estraro de ILEI daŭre petis, ke mi reprezentu la Ligon ĉi tie por substreki la kontinuecon de la Agado de ILEI por Afriko tra la jaroj.

Nelson Mandela diris: la plej potenca armilo por ŝanĝi la mondon estas **EDUKADO**.

Afrika Unio deklaris la jaron 2024 **JARO DE EDUKADO**.

La unua tanzania prezidento **Julius Kambarage Nyerere** tre atenteme zorgis pri la enhavo de la instruprogramoj en la lernejoj. Li subtenis la lokajn

lingvojn, abunde disvastigis la uzon de la **svahila lingvo**. Li organizis, ke infanoj en la lernejoj malkovru **novajn agrikulturajn metodojn**, kaj tiuj infanoj alportis tiujn novajn farmanierojn al siaj familioj. Tiel agrikulturo bone evoluis. Li provis kunmeti disajn vilaĝojn por konstrui en ĉiu el ili **lernejon** kaj **sanservon**. Li la unua aperis en Unuiĝintaj Nacioj surhavante afrikstilajn vestaĵojn. Li estis fiera afrikano, saĝa kaj efika. La nuna mondo bezonas tiajn ŝtatestrojn.

Nun aperas antaŭ ni multaj defioj. La Historio ne plu povas helpi nin trovi solvojn; ni devas esti kreemaj. Ni ĉerpu informojn kaj kuraĝon por iri novajn vojojn, ni trovu inspiron ĉe tiuj afrikaj eminentuloj, lumturoj por la tuta homaro. Ni plej zorgeme atentu pri adekvata instruado en ĉiuj eblaj lokoj, kie ni havas tiun noblan taskon.

ILEI eldonis lernolibron pri EO en la svahila de Nino Vessella, kaj nun tute novan lernolibron de Joël Muhire kune kun John Magessa. Ĵus aperis nova lernolibro en la svahila en Kroatio, per la kontribuo de fama burundano Eric Nsabiyumva. Plie vi havos dum la Kongreso la eblon perfektigi viajn instrukapablojn partoprenante kurson sub la gvido de profesorino doktorino Miora Raveloharison. Vortaroj kaj lernolibroj kune kun abunda literaturo troviĝas en la Libroservo je via dispono.

Mi finas menciante afrikajn proverbojn:
Sidanta maljunulo vidas pli for ol staranta junulo.
Mortanta maljunulo similas al brulanta biblioteko.
Paŝu en la spuroj de via patro kaj ĉio iros glate por vi. Tiu ĉi proverbo ŝajnas al mi bremsa: kion faru genia infano? Ĉu tiu brila infano restu malantaŭ sia patro? Bonvolu pripensi.

Mi deziras al vi fruktodonan pripensadon kaj agrablan kongreson!

„La Tago de Lernado” hibride

Tradicia programero de la Universalaj Kongresoj, "La Tago de Lernado" dum la 109-a Universala Kongreso en Aruŝo, okazinta la 6-an de aŭgusto 2024 estis inter la malmultaj programeroj, kiuj okazis hibride.

Riĉa, seshora programo marde allogis plurajn kongresanojn, sed same virtualajn partoprenantojn de Brazilo, tra pluraj eŭropaj landoj kaj Irano, ĝis Japanio. La partoprenantaro vigle sekvis la prelegojn, sed same diskutojn.

Enkonduke, salutvortojn adresis la prezidanto de UEA Duncan CHARTERS, kiu mem estis prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) inter 1993 kaj 1998, esprimis ĝojon pri la fakto, ke la Tago de Lernado estas grava programero de la UK-oj. Li asertis, ke la „instruado estas unu el la ĉefaj kolonoj de la strategia planado de UEA kaj ĝuste pro tio UEA kunlaboras kun ILEI por realigi strategiajn planojn de ambaŭ organizoj. Tiuj strategiaj planoj necesigas la instruadon de Esperanto en la mondo. La eksperimentoj povos esti utilaj por antaŭenigi la komprenon, ke Esperanto estas la plej efika solvo por eduki lernantojn al internacia kompreniĝo".

La prezidanto de ILEI, Ahmad Manduhi, dankis al ĉiuj, kiuj helpis al la organizado de la unua UK en Afriko, kaj la Tago de Lernado. Li, i.a. diris, ke la ĉeftemo de la ĉi-jara UK estas tre inkluziva, kaj signifohava niaepoke: „Homo, lingvo kaj medio por pli bona mondo". Laŭ li, ni esperantistoj emfazas ĉiujn aspektojn de la kongresa ĉeftemo, t.e. ni kiel homoj, kiuj ja gravigas la mondan komunan lingvon, devas pensi ankaŭ pri nia ĉiutaga medio, en kiu ni vivas, kaj pri pli bona mondo pere de la savota medio kaj Esperanto. Li kredis, ke la prelegoj de ĉi tiu Tago estos paŝoj en tiu direkto.



Mulele MBASSA prezentis la eduksistemon de Tanzanio en ĉiuj etapoj: de la infanvartejoj ĝis universitataj studoj. Mireille GROSJEAN (Svislando), kiel bona konantino pri la afrika movado, reliefigis la instruadon en Afriko kun atentigoj al defioj kaj evoluo, aldonante plurajn ekzemplojn [*vd. la foton supre*]. Sac. Gabriel ANDA (Kamerunio) prezentis la spertojn pri edukado de la plej junaj infanoj kadre de la antaŭ unu jaro

fondita lernejo "Baba Simon", kiun subtenas IKUE. Eo-instruadon en Burundo kaj Afriko prezentis la ĵus elektita nova estrarano de ILEI kaj gvidanto de la Afrika Komisiono, Aime Patrick MANIRAKIZA (Burundo). Li ankaŭ surpodiigis e-istojn el Burundo, kiuj donis gravan kontribuon al la disvastigo de la movado kaj instruado de E-o. Ĉiuj kvar prelegoj vekis grandan intereson ĉe la ĉeesta kaj ankaŭ ĉe virtuala publiko, kiu starigis plurajn demandojn. Malgraŭ plilongigo de la antaŭpaŭza bloko, neniu bedaŭris pro la tempo, ĉar vere oni povis multon novan aŭdi kaj same multon lerni. La duan blokon de la prelegoj malfermis Miroslav MALOVEC (Ĉehio) per la prelego "Kiel oni kreas vortaron?" La prelego donis eblon iomete gustumi la eldonan agadon de la lando, kiu gastigos la 110-an UK. Stela BESENYEI-MERGER (Hungario) dum la prelego "Esperanto kaj edukado: La rolo de literaturo" apartan atenton donis al la "Bobelarto" (https://bobelarto.ink/eo/konkurso/), kaj instigis la kongresanojn verki kaj partopreni en la konkursoj.

Pri profesia agado rilata al la instruado de Esperanto al la infanoj kaj junuloj laŭ la ekzemplo de la lernejo "Granda Ursino" en La Chaux-de-Fonds, Svislando, rakontis Mónika Molnár [*vd. la foton maldekstre*]. Ŝi kunportis ankaŭ diversajn lernilojn, kiujn ŝi transdonis al la esperantistoj, kun kiuj ŝiaj lernantoj starigis korespondadon, sed ankaŭ ne mankis materialo por aliaj afrikaj e-istoj, kiuj instruas E-on.



Kvankam la titolo de la prelego de Kristin TYTGAT (Belgio) "Paroliga kurso dum kongreso - ĉu utila programero?" entenas demandosignon, la spertoj de la prelegantino mem, sed ankaŭ de partoprenantoj, evidentigis, ke la paroligaj kursoj ne nur estas utilaj, sed vere bonegaj rimedoj por paroligi kaj kuraĝigi e-istojn, ĉu komencantojn, ĉu tiujn, kiuj vivas ie

izolitaj. La lastan prelegon "Ĉu ni forgesis pri la universalaj valoroj?" prezentis Marija BELOŠEVIĆ (Kroatio), kiu kunordigis la tutan programon. Ŝi atentigis pri la graveco de valoroj en la nuna tempo kaj ke nepras pri ili ankaŭ pensi dum la E-kursoj. Post la diskutoj, Katalin KOVÁTS donis gravajn informojn rilate edukado.net kaj KER-ekzamenojn.

Marija BELOŠEVIĆ, kunordigantino de la Tago de Lernado

Komitatkunsido de UEA



Dum la ĉi-jara 109-a UK en Aruŝo, la Komitato de UEA havis nur unu kunsidon pro la fakto, ke oni decidis doni eblon al la komitatanoj kiel eble plej multe ĝui la kongreson. Vendrede iom pli ol trihora kunsido antaŭis al la komitataj forumoj pri: Kunlaborado, Informado, Eksteraj Rilatoj kaj Instruado. ILEI aparte tuŝas la lastajn du. Tiel en la "Rekomendoj al la Komitato de UEA" de la Forumo pri Eksteraj Rilatoj, oni i.a. povas legi:
- kunlaboro kun ILEI por edukaj programoj de Unesko. La Forumo pri Instruado resume rekomendas:

- daŭrigi la konstantan kunlaboron kun ILEI por plenumi la laborplanojn de ambaŭ asocioj;
- daŭran kunlaboradon kun edukado.net kaj subtenon al la KER-ekzamenoj.

Oni atentigis ankaŭ pri la neceso de longdaŭra laborgrupo por organizi internacian eksperimenton pri la valoro de Esperanto kiel lernfaciligilo por lingvoj kaj instrumento por kreskigo de interkultura kompetento. Same estis substrekita kunlaborado kun projektoj de ILEI kaj projektoj de aliaj asocioj, kiel *30 Oraj Horoj* en Italio, kiun oni ĝisdatigos por etendi ĝin al aliaj landoj, se pro la rezultoj eblos peti kaj ricevi aliajn stipendiojn. Laŭ rekomendoj, gravas subteno de instruado je universitata nivelo kun pli da kunlaborado inter izolitaj universitatanoj kaj esploristoj kaj plia utiligo de la Amsterdama Katedro tiucele. Necesas trovi laŭeble programon, kiu iel anstataŭos la finiĝantan programon en Poznano. Daŭre ni devus zorgi pri nia apero en konferencoj kaj virtualaj seminarioj kaj simpozioj, kiel tiuj organizitaj de CED kaj la Novjorka oficejo de UN.

Marija BELOŠEVIĆ, Komitatano A ILEI - anstataŭanto

Unika eksperimento finiĝas per bonaj rezultoj en AMU

de Prof. Ilona KOUTNY, Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, AMU, en Poznano (PL)

La 25-jarojn de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj en la Unversitato Adam Mickiewicz (UAM aŭ AMU) ni festis per la lanĉado de **magistraj Studoj pri interlingvistiko** kadre de la studdirekto *Lingvistiko kaj informmastrumado* en 2022. La Studoj surloke, en Poznano, enhavis ne nur studobjektojn rilatajn al la lingvo, kulturo kaj movado de Esperanto kaj planlingvoj, sed ankaŭ perfektigon en la angla lingvo kaj angle informmastrumadon (ciferecan humanistikon). En la centro troviĝis ankaŭ interkultura komunikado kaj lingvopolitiko, sume, donante bonan bazon al la studentoj por trovi laboron poste.

La unikaj magistraj studoj startis kun 10 ĉinaj studentoj (el kiuj 7 el la Universitato en Zaozhuang), kvankam ni atendis pli internacian grupon. Ĉiuj dek nun atingis la finon de siaj dujaraj studoj. La 27-an de junio 2024 tiuj **7 studentoj sukcese trapasis la magistran ekzamenon**, kiam ili defendis

siajn diplomlaboraĵojn kaj respondis al demandoj. Iliajn laboraĵojn vi povos baldaŭ legi en Edukado.net. La recenzado donis eblecon kunlabori kun eksterlandaj kolegoj (prof. Sabine Fiedler, prof. GONG Xiaofeng, d-ro Markos Kramer) kaj kun d-ro Maciej St. Zięba el Pollando (kiu instruis la studentojn en la Universitato de Zaozhuang), ili rete aliĝis al la ekzameno. Jen la temoj de la studentoj:

LI Bochuan: Seksismaj elementoj en la lingvo Esperanto

LIU Dehan: La rolo kaj influo de virinoj al la lingvo, literaturo kaj movado de Esperanto

LONG Yunxia: Vortoprovizo de la homa vivo en temaj grupoj en la angla, Esperanto kaj la ĉina, kaj apliko en la lingvoinstruado

SUN Yesheng: Ellaboro de temvortaro en la tereno de loĝado en la angla, Esperanto kaj la ĉina

ZHANG Yue: Komparo de la lingva bildo de la mondo en la ĉina kaj Esperanto

ZHAO Yanan: Reflektiĝo de la ĉina kulturo en Esperantaj tekstoj

ZHU Xinlei: Elektitaj bibliotekaj kolektaĵoj pri Esperanto kaj interlingvistiko

Ĉiuj studentoj esprimis la deziron plu kunlabori, en la vortara projekto de Ilona Koutny aŭ plu esplori kaj verki artikolon el sia temo. Iuj povas dungiĝi en la Universitato en Zaozhuang, en la Esperanto-Muzeo, kaj pensas eĉ pri doktoriĝo en AMU. Ili donos freŝan forton por la ĉina movado.

Tuj antaŭ la ekzameno aperis la ***Angla-Esperanta-Ĉina etvortaro pri Homa vivo kaj Loĝado***. Temas pri la aktualigita kaj ĉinigita versio de la *Angla-Esperanta-Hungara etvortaro* de Ilona Koutny. Du studentoj el la magistra interlingvistika grupo, LONG Yunxia (Nuba) kaj SUN Yesheng (Suno) pretigis la ĉinajn versiojn, kontrolis ilin GONG Xiaofeng (Arko). En la libreto troviĝas ankaŭ ekzercoj por uzi la vortaron en progresanta nivelo de Esperanto – kion la studentoj povis sperti.

En julio aperis ankaŭ la alia volumo de la temvortaro: ***Angla-Esperanta-Ĉina etvortaro pri Lernado kaj Laboro*** danke al la kunlaboro de aliaj du studentoj: YU Jianchao (Terana) el la postdiploma interlingvistika grupo kaj ZHANG Changsheng (Longarko) el la Instruista trejnado, kontrolis ilin LI Weilun. La ĉina versio estas parto de ilia diplomlaboraĵo.

Ankaŭ tiun ĉi vortaron kompletigas leksikaj kaj komunikaj taskoj pretigitaj de Ilona Koutny.

Same en julio du aliaj studentoj trapasis la magistran ekzamenon, kiujn prijuĝis d-ino Alessandra Madella kaj prof. Bengt-Arne Wickström. Iliaj temoj estas:

ZHANG Heyi: Propedeŭtika valoro de Esperanto por ĉinaj lernantoj por lerni la anglan,

XIE Tianci: Komparo de la angla kaj Esperanto kiel internaciaj lingvoj.



***La 3 aŭtoroj**: Nuba kies diplomlaboraĵo estis la vortara ĉapitro pri homa vivo kun enkonduka parto pri la uzo de temvortaroj en la instruado kaj tradukaj problemoj pro la malsamaj kulturoj; Ilona Koutny; Suno kies diplomlaboraĵo estis la vortara ĉapitro pri loĝado kun enkonduka parto pri ĉinaj-Esperantaj vortaroj kaj tradukaj problemoj en la ĉapitro pro la malsamaj kulturoj.*

P.S. Kaze de la dua anonco de la studoj en 2023 – post sukcesa unua jaro – neniu esperantisto aliĝis krom 5 ĉinaj studentoj, kio ne sufiĉis por startigi la sekvan grupon. UAM fermis la studojn. La nuna realigo restos unika, tre pozitiva, eksperimento.

La apo LearningApps por Esperantaj didaktikaj ludoj

de Ladislau AFONSO (Brazilo)

Enkonduko

Ĉiuj agnoskas, ke didaktikaj ludoj povas helpi lernantojn plibonigi sian lingvonivelon laŭ pli facila maniero. Ili plej ofte rolas en la individua lernado aŭ aplikado de la lingvo.

Ĉar la plejmulto de la homoj adaptiĝis al uzo de komputilo, tabulkomputilo, saĝtelefono ktp, tial estas tre oportune, ke esperantistoj havigu al la nunaj kaj venontaj generacioj tiajn rimedojn por disvastigi Esperanton.

Sur la paĝo 158 de la *Manlibro pri instruado de Esperanto* estas skribite: „La vorto ludo aludas al tio, ke la agado estas tamen ‘ne tiom serioza’ kiom la lernado mem, la partopreno kaj atingita rezulto ne estas taksataj per la kutimaj notoj, la ‘ludantoj’ estas liberaj, povas preni riskojn sen vere perdi aŭ esti punitaj...”

Pri LearningApps

‘LearningApps.org’ estas retejo 2.0 por krei malgrandajn interagajn erojn, kiuj povas esti integrataj rekte en lernan enhavon kaj uzataj por subteni instru-lernajn procedojn. La konstrueroj ankaŭ povas esti ŝanĝitaj aŭ rekreitaj interrete. Eblas aliĝi al „learningApps.org” senpage.

La registriĝo permesas konservi la ludojn, kiujn ni faris.

Pli ol 350 ludoj en Esperanto troviĝas en la reto, kaj oni povas uzi ilin por helpi instruadon, allogi kaj interesi gelernantojn. Vidu tiujn ludojn en la retpaĝo: (https://learningapps.org/user/ladislau).

En la retejo supre maldekstre troviĝas lupeo (Trovi en apo), tie oni povas serĉi ludojn jam kreitajn en diversaj lingvoj. Simple tajpu vortojn pri la temo, kiun vi volas trovi.

Alklaku sur la butonon „Vidu Apon”, kaj aperos ĝenerala paĝo por koni la ludojn; sur la ekrano aperas la ludoj disponeblaj.

Oni povas ŝanĝi la lingvon por koni aliajn ludojn disvolviĝintajn en aliaj landoj. Tial vi havas pli grandan elekteblecon de alispecaj variantoj. Per la nova elektita lingvo, vi konstatos, ke la montritaj ekzemploj de ludoj estas malsamaj ol la aperantaj en via denaska lingvo.

La ludoj, kiujn vi opinias taŭgaj por via instrucelo, meritas esperantigon.

Antaŭ ol komenci la kreadon de ludo oni devas elekti la lingvon.

La platformo ebligas uzon de pluraj lingvoj, sed Esperanto ankoraŭ ne troviĝas inter ili.

En tiu elektita lingvo aperos la ĉefaj instrukcioj de la ludo.

Kiam vi serĉas ludon, eblas elekti la nivelon de la ludo, de baza ĝis profesia. Trovu la vorton stadio/etapo, kie eblas filtri la nivelojn. Tiu ago difinos ludojn, kiuj aperos por vi. Se oni elektas la profesian nivelon, ĉiuj niveloj, sendistinge, aperos dum via serĉado. Per tiu apo oni povas krei plurnivelajn testojn, kiujn kandidatoj de KER-ekzamenoj devas lerni.

Elektu *kategorion* por filtri temojn de via intereso:



La butono skribita **kategorio** aliras al aparta karakterizaĵo de tiu aplikaĵo. Ekzemple oni povas elekti inter pluraj fakoj, kiel historio, arto, ekonomio, scienco, geografio, muziko, literaturo, filozofio, matematiko, teknologio, lingvo ktp.

Post tiu esploro, per alklako sur la butono de la elektita kategorio, aperos malsupre pluraj ludoj, kiuj rilatas al via elekto. Per tiu butono „**vidu apon**”oni vidas la paĝon de ĝeneralaj apoj pli detale.

Ĉiu ludo estas montrata per bildeto. Alklaku sur la bildeto kaj aperos detala paĝo de la koncerna ludo. Se aperos instrukciaj paŝoj per teksto, oni legu ĝin kaj poste devas konsenti por fermi ĝin.

Poste serĉu la bluan butonon, ĝenerale, malsupre kaj dekstre kaj premu ĝin per muso por komenci la ludon. Ĉiu apo permesas rekreadon de ĝia enhavo.

Kreado de ludoj kaj modeloj

Per la modelo de la malfermita apo oni povas rekrei novan personan apon.

La programo permesas aldoni bildojn kaj skribi tekstojn. La butono, kiu ebligas rekrei, estas: ***krei similan aplikaĵon*.** Atinginte tiun punkton, eblas esperantigi la tekstojn. Vi devas traduki ĉiujn vortojn permesitajn de la programo.

Ekzistas pluraj modeloj. Ĉar ĉiu modelo havas apartajn karakterizaĵojn, tial vi povas elekti ilin laŭ la nivelo de via ludo kaj la celo de viaj gramatikaj instruoj. Premante sur la butono kun la nomo: *ekzemplo*, eblas rigardi la ekzemplojn kreitajn laŭ antaŭe elektita modelo.

Vidu la tipojn de la modeloj:

Parigado - Per tiu tipo de ludo oni povas elekti unu temon. Oni devas elekti la bildojn kaj respektivajn vortojn, per kiuj oni volas ekzerci sin pri la vortoprovizo. Sufiĉas, ke la uzanto kunligu, per la muso, la bildon kaj la tekston. Se la respondo estas ĝusta, la paro malaperas - vi devas elekti tiun opcion dum la kreado. Se la respondo estas malĝusta, la bildlimoj de la paroj fariĝas ruĝaj. Eblas refari la mispaŝojn aŭ daŭrigi la ludadon.

Interrilato de informoj kun bildo. Oni devas meti fiksilojn sur la parton de la dezirata ero de la bildo kaj poste skribi vortojn koncernajn al tiu ero. La frazoj rakontas, priskribas ion kaj vi devas asocii ĝin kun la bildo. Oni povas konsideri tiun modelon ankaŭ kiel tipon de parigado.

Vortoserĉado - tiu tipo estas tre alloga kaj, per ĝi, novaj vortoj estas enkondukitaj. Defiu vian menson kaj pligrandigu vian vortprovizon. La aplikaĵo kreas kadron kaj oni devas serĉi la vortojn troviĝantajn horizontale, vertikale kaj eĉ diagonale.

Memorludo - Per tiu ĉi tipo, oni povas facile krei ludon por plibonigi la vortoprovizon kaj samtempe amuzi la gelernantojn. Alia avantaĝo de tiu ĉi tipo de ludo estas ekzercado de neŭronoj per stimulado de nia memorkapablo. Oni povas elekti temojn, per kiuj, krom pligrandigi la vortoprovizon, eblas klerigi la ludantojn.

Ordigo de aferoj laŭ kronologia aŭ historia sinsekvo.

Krucvorto aŭ krucvortenigmo – tiu fama distraĵo, kies celo estas plenigi la kampojn de dudimensia krado per literoj, tiel ke horizontale kaj vertikale aperas vortoj kun antaŭdifinita signifo. Tiu tipo de ludo ebligas uzi diversajn temojn por efike lernigi dum ĝojaj kaj plezurigaj momentoj.

Krucvortoj estas tre ofta ŝatokupo en gazetoj kaj revuoj kaj ankaŭ tre popularaj en la interreto. La celo estas trovi ĉiujn vortojn, dum ni uzas la disponeblajn helpilojn. Ĉar iuj vortoj estas plenigitaj, kelkaj literoj de aliaj vortoj aŭtomate aperas, kio faciligas solvi la enigmojn.

Kreado de originalaj ludoj

Nun sekvos la paŝoj por kreado de originalaj ludoj. Unue alklaku la butonon **"Krei aplikaĵon".** Krom rekrei la ekzistantajn apojn kiel modelojn, oni povas uzi malplenajn modelojn por krei originalan apon. La butono Krei Apon ebligas fari tion; la modeloj montriĝas ankaŭ per bildetoj. Poste oni devas elekti la modelon.

Alklaku la elektitan tipon kaj aperos ekzemploj. Elektu unu el la ekzemploj disponigitaj kaj alklaku „*krei novan apon*". En la sekva paŝo oni devas krei taŭgan titolon. Alklaku 'elektu bildon', vi jam devas havi en via komputilo la bildojn antaŭe elŝutitajn kaj poste vi alŝutu la adekvatan bildon.

Metu la „fiksilon" en formato de pinglo sur la koncernan lokon, kiun vi antaŭdecidis por fari vian didaktikan ekzercon. Eĉ se vi ne finis tajpi aŭ redakti ĉiujn erojn, estas prudente konservi la jam faritajn paŝojn. Alklaku nun sur la vorto „Teksto". Enskribu la koncernan tekston. Kompletigu la ludon per aldonoj de aliaj „pingloj" kaj tekstoj.

Antaŭ ol publikigi vian ludon, vi devas testi ĝin kaj certiĝi, ĉu ĉio estas en ordo. Alia paŝo estas skribi tekston en la komenco de la ludo por klarigi al la ludantoj pri la farotaj paŝoj aŭ vi povas skribi tekston pri la temo de la ludo.

Alklaku la butonon „fini", kiam vi finas la kreadon.

Konservado kaj disvastigado de la ludoj

Post la kompleta aldono de informoj, oni devas konservi ilin kaj la ludo aperos en la kolekton de la konto, kiun oni jam registris. Post tiuj laboroj ne forgesu, ke via ludo estas destinita al la tuta mondo; nun faru la paŝojn por ke la ludo iĝu publika.

Kiam vi faris tion, via ludo aperos mondskale en la reto. Kiam vi signos tiun opcion, aperos la venontaj postuloj:

TITOLO: Skribu taŭgan titolon por via ludo. Tiu nomo estas grava por la esploro de uzanto. Kiam li/ŝi serĉos ludon, tiu titolo de la ludo helpos trovi la esploratan temon.

KATEGORIO: En tiu ĉi paŝo, oni devas elekti inter pluraj neŝanĝeblaj kategorioj. Tiuj kategorioj montras lingvojn kaj fakojn kiel historio, scienco, muziko ktp. Mi elektas **alian lingvon**, ĉar, kiam uzantoj esploras ludojn laŭ lingvo, la ŝanĉo trovi Esperanton per tiu ĉi opcio estas pli granda. Tiu elekto influas la serĉadon de ludo laŭ kategorio.

SUBKATEGORIO: Tie ĉi eblas tajpi kaj aldoni tekston. Mi preskaŭ ĉiam aldonas la vorton Esperanto por plifaciligi, ke aliaj trovu tian ludon faritan en la internacia lingvo.

„ETIKEDOJ AŬ *TAGS*": Ankaŭ tie ĉi eblas ŝanĝi kaj aldoni novan tekston. Preferinde skribu ion, kio faciligos la eltrovon de via ludo. Se oni skribas „Esperanto", tio estas kroma provo atingi nian celon, kiu estas disvastigi kaj lernigi ĝin.

NIVELO: En tiu ĉi paŝo oni devas elekti la nivelon de la ludo. Estas kvin niveloj de la baza ĝis la profesia edukado.

Por fini la plenigon de postuloj por la konservado mondskale oni devas marki la du kvadratetojn por peti la akcepton de la ludo fare de la teamo de tiu aplikaĵo. Kiam vi faris tion, la butono SENDU PERMESON aktiviĝas kaj estas la momento por alklaki sur ĝi por submeti la ludon al kontrolo de la teamo. En la opcio „konta agordo" estas montrate, kiom da fojoj viaj kreitaj ludoj estas viditaj. Kiam la rezulto atingas la kvanton de 100, 500 aŭ mil fojoj, vi ricevas aŭtomatan mesaĝon en vian retpoŝton, fare de la teamo, por gratuli vin.

La „okuleto" montras, kiomfoje la uzantoj ludis per tiu didaktika rimedo, kio ebligas kontroli, ĉu la ludo estas bone akceptita de la publiko. Tiuj estas la ligiloj por kopii kaj plusendi la ludojn al viaj kontaktoj. La

kreanto de ludoj povas disvastigi la ludojn en siaj retoj de amikoj. Krom tio oni povas aldoni la apon al alia retejo.

Konkludo

Didaktikajn ludojn oni aplikas kadre de instruado. Per ili oni ne nur malstreĉiĝas, sed ankaŭ ekzercas sin pri lingvaj elementoj. Kiel aŭtomataj ekzercoj, eblas fari parigadon, pendumilon, reordigon. Kiel duon-aŭtomataj ekzercoj, eblas fari kompletigon de frazo, demandojn kun opcioj de respondoj. Kaj al la ne-aŭtomataj ekzercoj, kiuj havas demandojn, eblas aldoni tekston kaj fari demandojn (ĉu, kio, kiu, kiom da, kie ktp.)

Krom la enhavo de lingva gramatiko, per tiuj ludoj eblas esplori la movadon, kulturon kaj historion de Esperanto.

El la landoj kaj sekcioj…

Ĉinio

Mi profitas multe de la Esperanta Plaĝo

Saluton, geamikoj, mi estas Jadina, mi venis el la urbo Taiyuan, Shanxi-provinco, Ĉinio, kaj estas instruistino de Esperanto en la Elementa Lernejo Baiyangshujie, kiu tre famas en la ĉina Esperanto-rondo.

Por perfektigi mian lingvo-posedon kaj profundigi la E-instruadon en nia lernejo, en aprilo ĉi-jare mi speciale venis al la bela urbo Valencio de Hispanio por partopreni en la paroliga kurso gvidata de profesoro Dennis Keefe. La kurso okazis jam en lastaj jaroj, trifoje po du monatoj. Ĝis nun tri ĉinoj, venintaj el Wuhan, Chongqing, Taiyuan, partoprenis en ĝi kaj mi estas la tria inter ili. Eble pro tio, ke la mediteranea urbo Valencio havas komfortan klimaton, belajn pejzaĝojn, longan historion kaj aktivajn esperantistojn kaj tre oportunas al la Esperanto-trejnado, la esperantistoj donis al ĝi la nomon Esperanto-plaĝo.

En la kurso, la lecionaro estas aranĝita science, abunde kaj riĉe. En la komenca monato nia ĉefa tasko koncentriĝas al lernado de BEK-kursaj lecionoj, okhore ĉiutage, krome ni ankoraŭ havas ekskurson kaj renkontiĝon kun lokaj esperantistoj unufoje ĉiu-semajne. En la sekvanta monato, la lecionaro pli profundiĝas kaj riĉiĝas. Krom la lernado de lego-libroj bone kompilitaj de Dennis, nome Literaturo kaj la Vortlernigilo, ni ankoraŭ devas

lerni didaktikon kaj partopreni en praktikaj aktivadoj, ekzemple viziti muzeon, pitoreskajn lokojn, partopreni en aranĝoj de lokaj esperantistoj kaj tradiciaj festoj ktp. Tio pli helpas mian lingvo-lernadon, kaj pere de ĝi mi vere spertas la tradiciajn valenciajn vivon kaj kulturon. Nun, kvankam mia du-monata lernado ankoraŭ ne tute finiĝis, tamen mi jam sentas, ke mi multe progresis kaj havas kuraĝon kaj memfidon en parolado de nia lingvo.

Ĉe la fino, mi volas danki al Dennis pro la Esperanto-plaĝo, kie mi konatiĝis kun multaj amikoj. Samtempe mi devas danki ankaŭ nian lernejon Baiyangshujie, kiu esperantistigis min kaj donis al mi ŝancon pli vastigi mian scion pri Esperanto kaj la mondo, kaj ĉiujn samideanojn, kiuj donis al mi subtenojn de ĉiuj flankoj.
Ĝis, miaj karaj amikoj.

Unua somera infana tendaro pri fremdlingvoj en Zaozhuang

De la 5-a ĝis la 10-a de julio 2024, 14 infanoj partoprenis en tendaro organizita de la Esperanto-Muzeo de Zaozhuang-Universitato.

Inter multaj agadoj estis gustumado de 4 fremdaj lingvoj: Esperanto, la angla, la itala kaj la korea. La celo estis doni al la infanoj la eblon sperti komunikadon en diversaj lingvoj. Krom mi, instruis s-roj Semio (Sun Mingxiao), Dekmil, Choi Manwon el Koreio kaj John Huang el Kanado, prezidanto de la Nordamerika sekcio de IKEF.

La lecionoj okazis en la Esperanto-Muzeo.



Infano ludas kun la pac-kolomboj en la Esperanto-Muzeo dum paŭzo



S-ro Semio printas specialajn Esperantajn t-ĉemizojn por la gelernantoj.

Burundo

La Feliĉa Konsiderado de la Infanlerneja Jaro ĉe „La Espero”.
La 28-an de junio 2024, la infanĝardeno „La Espero” en Rumonge festis triumfan finon de la lerneja jaro 2023-2024. La ceremonio, plena de ĝojo kaj kuraĝo, spegulis la sukceson kaj kreskon de ĉiuj partoprenantoj dum la lasta lerneja periodo.

1. Gratulaj vortoj de la direktorino
La ceremonion malfermis la direktorino de la infanĝardeno, esprimante sian tutan dankon al ĉiuj ĉeestantoj, precipe al la gepatroj kaj lernejaj aŭtoritatoj. Ŝi substrekis la engaĝiĝon de la gepatroj en la edukado de iliaj infanoj kaj dankis la lernejan administracion pro ilia gvidado kaj vizio.

2. Infanludoj kaj talentmontrado
Post la emociaj vortoj de la direktorino, la infanoj kun granda entuziasmo partoprenis en la ludoj kaj montris sian talenton per kantoj, recitadoj kaj

Esperantaj salutoj. Iliaj prezentadoj brilis per kreemo kaj progresado, montrante la rezultojn de bonega edukado kaj atento de la instruistoj.

3. Aplaŭdis la Asocio ANEB

La nacia asocio de Burundo (ANEB), reprezentata de sinjoroj Pamphile kaj Hassano, adresis dankvortojn al la instruistoj kaj infanoj por ilia nekredebla kapablo kaj evoluo dum tiu jaro. La reprezentantoj de la asocio emfazis la gravecon de la edukada komunumo kaj la subteno de gepatroj por la edukado de siaj infanoj.

Ili ankaŭ profunde dankis ĉiujn organizojn kaj individuojn, kiuj ne nur havas grandan influon en la evoluo de niaj programoj, sed ankaŭ konstante donas sian subtenon. Per la konstanta helpo, ni povas plenumi niajn misiojn kaj provizi altkvalitan edukadon al la infanoj en la infanĝardeno.

4. Vortoj de deziro kaj sntaŭvido

Unu el la gepatroj esprimis profundan dankon al la lerneja administracio kaj prezentis sian deziron pri la estonta evoluo de la infanlernejo „La Espero" per enkonduko de bazlerneja sekcio. La gepatroj certigis sian subtenon kaj kredon, ke la lernejo povos plu prosperi sub la zorgado de la aŭtoritatoj. La gepatroj diras, ke post la tria klaso de „La Espero", ili alportas siajn infanojn al aliaj lernejoj, ĉar „La Espero" ne havas bazlernejon.

5. Finaj ceremonioj kaj donacoj

La ceremonio atingis klimakson per la disdonado de lernejaj bultenoj kaj donacoj al la infanoj, kio simbolis solidarecon kaj subtenon de la komunumo. Ĉi tiu momento de donaco kaj bonvolo estis la perfekta finaĵo de la lerneja jaro.

La fina vorto de la ceremonio estis esperplena, asertante ke la infanĝardeno „La Espero" restos brila stelo en la vivo de ĉiuj infanoj kaj ke la komunumo estas unuigita por la bono de ĉiuj ĝiaj membroj.

Tiel, kun ĝojo kaj gratuloj, la infanlerneja jaro 2023-2024 ĉe „La Espero" finiĝis, lasante post si sentojn de kontenteco kaj antaŭvido pri la estontaj sukcesoj kaj pliboniĝoj en la lernmedio.

6. Vizio por la estonteco

La ceremonio ne nur festis la pasintan jaron, sed ankaŭ lanĉis novajn projektojn kaj iniciatojn por plibonigi la edukan spacon. La Esperanto-Centro de Rumonge nuntempe gastigas la infanlernejon kaj tre baldaŭ gastigos komputilcentron.



Ni planas ankaŭ aliajn projektojn celantajn junularon kaj virinojn, kiel kudraj metiejoj kaj aliaj similaj iniciatoj. Ĉi tiuj klopodoj celas plifortigi la kapablojn kaj ŝancojn disponeblajn al ĉi tiuj grupoj, tiel kontribuante al ilia persona kaj profesia evoluo en nia komunumo. Ĉi tiuj projektoj celas ne nur provizi ŝancon por ludi kaj lerni, sed ankaŭ kontribui al la socia kaj kultura evoluo de la kvartalo.

Ni ĝojas anonci kaj alvoki ĉiujn pri la eblo partopreni en speciala projekto ĉe la Esperanto-Centro de Rumonge. Ni serĉas entuziasmajn kaj kapablajn volontulojn, kiuj povas kaj volas kunlabori kun ni por plenumi gravajn taskojn kaj iniciatojn en nia komunumo. Ĉu vi estas organizo, asocio Esperanta aŭ neEsperanta, aŭ simple individuo kun intereso helpi kaj plifortigi nian centron kaj subteni niajn ĉiutagajn agadojn?

Bonvolu kontakti nin, se vi interesiĝas partopreni en tiu ĉi bona afero, aŭ se estas proponoj, konsiloj ktp. Kun via helpo ni povos plu kreskigi kaj prosperigi nian komunumon kaj la valoron de Esperanto en la regiono.

Hassano NTAHONSIGAYE <hasanntaho@gmail.com>

Francio

Saluton, karaj geamikoj! Vi trovos sube artikolon verkitan de unu el miaj eksaj gelernantoj de la Esperanto-ateliero de mia mez-lernejo en Salins-les-Bains (Francio). Basile ĵus abiturientiĝis. Li estas ano de Amika Rondo kaj do de JEFO (Junulara Esperanta Franca Organizo). Dum tiu ĉi somero li zorgis pri infanoj kaj prezentis al ili Esperanton. Tio okazis kun Asocio „Rougemont Loisirs" de la 13-a ĝis la 27-a de julio 2024 proksime de Censeau (Ĵuraso, Francio).

Emmanuel Desbrières



„Mi nomiĝas Basile kaj ĉi-somere mi zorgis pri tendaro kun infanoj de ses ĝis dekkvar jaroj. Dum la tendaro, ni multe ludis en la arbaro kaj kelkfoje la infanoj elektis sian okupiĝon. Kompreneble, mi proponis Esperanto-malkovron. Fakte, mi lernas tiun lingvon ekde dek monatoj kaj de tiu momento mi deziras vojaĝi kaj partopreni Esperantan kongreson aŭ aliajn eventojn. Do evidente, ni parolis kun la infanoj pri tio, kion la Esperanta lingvo ebligas. Ĉar la forĝisto ne iĝas forĝisto danke al magio, ni babilis rekte en Esperanto.

Ili tre ŝatis tiujn prezentojn! Mi faris du atelierojn, kaj proksimume dek infanoj partoprenis. Poste, la infanoj montris la mojosajn Esperantajn kalendarojn al aliaj, kiuj ne partoprenis en la prezentoj, kaj kelkaj aliaj infanoj petis de mi Esperanto-babiladon!”

Serbio

Kvarpersona grupo el Serbio ĉi-jare partoprenis en Maratona kurso en Greziljono. Danijela PETROVIĆ kaj Tijana UGARKOVIĆ ĉeestis helpe de Serbia E-Ligo. Ili frekventis konversacian B-kurson, kiun gvidis Radojica PETROVIĆ el Serbio, kaj Nedeljka LOŽAJIĆ frekventis C-kurson, kiun gvidis profesorino Ilona KOUTNY.



La kursprelegoj okazis ĉiutage antaŭtagmeze. La studgrupoj ne estis grandaj kaj ni povis plene sekvi kaj aktive partopreni en la instruhoroj.
Dum la B-kurso, la studantoj verkis rakontetojn, eseojn kaj traktis gramatikajn temojn. La C-kurso estis pli interaktiva kaj ĉefe oni traktis temvortarojn kaj interparolis pri kulturaj similaĵoj kaj diferencoj.
Dum la posttagmezoj ni vizitadis allogajn lokojn. Interalie, ni vizitis mezepokan apotekon, du malnovajn kastelojn kaj dum Nacia festo, la 14-an de julio, ni perpiede iris al Bogue, kie oni prezentis mezepokajn dancojn. Ankaŭ pluraj el ni dancis helpe de francaj dancistoj kaj tio estis speciala travivaĵo.
Ni havis la eblon posttagmeze kaj vespere aŭskulti prelegojn pri kulturo, komunikado, pri Aŭstralio, Stutgarto...
La arta programo estis interesa kaj tiam ni aŭskultis muzikajn programerojn, kiujn plenumis Danijela, kiu ludis pianon. Stano el Britio kantis kaj kantigis ĉiujn. Nedeljka kantis kelkajn kantojn en Esperanto akompanante sin per gitaro. Bert tralegis vive rakonton de Mopasan (Guy de Maupassant), Roberto deklamis poemon de Tin Ujeviĉ kaj Verner el Germanio prezentis filmeton, kiu estis prezentita en Festivalo okaze de la 125-jariĝo de Esperanto.
Ni promenis ĉiutage en bela naturo for de la urba bruo kaj trafiko. La kastelo, kie ĉio okazis, estis agrabla loko kaj la etoso estis vere amika. Ni kunportis belajn memorojn de tie kaj, espereble, ni denove havos okazon ĉeesti similan eventon.

Ĉeestintoj el Serbio

En aprilo finiĝis kvin plurmonataj kursoj de kaj pri Esperanto, kiujn organizis la Sekcio de esperantistaj instruistoj de Serbio (SEIS) kaj pri kies komenco ni jam raportis en IPR 2023/4: kursoj por komencantoj – vidantoj kaj nevidantoj, B-konversacia kurso, B-tradukekzercoj kaj internacia kurso „Pri la historio de la Esperanta Literaturo". Partoprenintoj en tiu lasta, priliteratura prelegserio ricevis ciferecajn atestilojn pri la partopreno en PDF-formato, legebla ankaŭ por blinduloj.
La kursfinintoj de aliaj kvar kursoj povis ekzameniĝi ĉeeste aŭ rete. La ĉeesta ekzameno estis okazigita en Beogrado, la 1-an de junio 2024. En ĝi partoprenis tri kandidatoj, kiuj sukcese trapasis la skriban kaj parolan partojn de la ekzameno: Tijana UGARKOVIĆ (A-nivelo), Danijela PETROVIĆ kaj Lorijan POPI (B-konversacia). Unu semajnon poste okazis B-konversacia ekzameno por la dua grupo de kandidatoj, rete, pere de Zoom. La 8-an de

junio sukcese ekzameniĝis tri eksterlandaj kursanoj: Stevan KLJAIĆ (Montenegro), Mira MAKIVIĆ (Bosnio kaj Hercegovino) kaj Sophie RENAULT (Francio). Kvankam ne ĉiuj kursfinintoj deziris pritaksi sian scion pere de ekzameno, restis ankoraŭ interesiĝantoj por ekzameniĝi aŭtune, tiuj por kiuj ne konvenis la menciitaj datoj.

Atestiloj por ĉiuj ekzameniĝintoj estis solene enmanigitaj en Beogrado (Zemuno) en aŭgusto, dum la fermo de la kombinita evento „Interkulture kaj inkluzive“ – Internacia kongreso de blindaj esperantistoj kaj aldonaj eventoj.

Aranka LASLO

Tanzanio

La trejnseminario por Esperanto-instruistoj okazis de dimanĉo la 4-a ĝis vendredo la 9-a de aŭgusto 2024 dum la 109-a Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo, Tanzanio. Ĉiun tagon la sesio daŭris 90 minutojn. La ĉefaj organizantinoj de tiu trejnseminario estas Miora RAVELOHARISON kaj Mireille GROSJEAN. Nia ĉefa celo estis trejni geesperantistojn por igi ilin spertaj lingvoinstruantoj kaj provizi ilin per scioj kaj kapablecoj por instrui Esperanton al komencantoj.

Ĉeestis ĉi tiun seminarion 56 instruantoj el diversaj landoj: Belgio, Burundo, Ĉeĥio, Ĉinio, DR Kongo, Francio, Germanio, Japanio, Kenjo, Madagaskaro, Rumanio, Sud-Afriko, Svislando, Tanzanio.



12 el ili partoprenis en la kvin kompletaj sesioj kaj ricevis la atestilojn. Duncan Charters, la prezidanto de UEA, Mireille Grosjean, eksprezidanto de

ILEI, Aurora BUTE kaj Miora RAVELOHARISON disdonis la atestilojn dum la lasta sesio de tiu trejnseminario.
La trejniĝintoj ricevis malsamajn, novajn kaj interesajn spertojn de kvin trejnistoj. Per mallongaj teorioj pri instruado, instru-provado, trejnado, praktikado, kundivido kaj gruplaboroj, la kvin malsamaj gvidantoj riĉigis la kvin sesiojn de la trejnseminario. La partoprenantoj sekvis la trejnadojn entuziasme kaj pretas sekvi ĉiujn ricevitajn konsilojn. Ili deziras la daŭrigon de tiu trejnado por altigi la esperantan eduknivelon. Do, ni devas pensi pri tio kiel efektivigi tiun plenumeblan deziron.
"Kiam instruantoj estas bone kaj taŭge trejnitaj, la nivelo kaj la estonteco de Esperanto-instruado estas certigitaj".

Miora RAVELOHARISON

AMO-seminario ĝis la fino de 2024

Septembre okazos seminario en Albanio kun la temo 'La Esperanto-instruado kaj ties defioj en la aktualeco'.
Okazos seminario en Kulturcentro Greziljono, Francio, inter la 21-a kaj 30-a de oktobro. La temo estos pri junulara agado.
Novembre, inter la 11-a kaj 14-a, okazos la kutima seminario en Kroatio, kun temo rilate al bibliotekoj kaj literaturo. Tio okazos sub la gvido de la aktiva AMO-komisionano Marija Beloševiĉ kadre de evento pri la agado de Luĉija Borĉiĉ. Decembre heroldos la bonvenigon de nova lando al la familio de AMO: Armenio, la temo estos: 'Kiel organizi Eo-vojaĝojn kaj turismajn ekskursojn'. La seminario okazos kadre de ilia Zamenhof-taga festado.
Sekve la nombro de seminaroj okazintaj depost marto 2014 estos jarfine inter 113 kaj 116. Klopodoj pri AMO-seminarioj en Ĉinio kaj Kanado bedaŭrinde ne rikoltis sukceson.

Stefan MACGILL

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (*prez., dumtempe pluservanta ĝis la venonta elekto*)
Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.
Kontrola: Simon Smits, Nvard Manveljan.
Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Oberrauch, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.
Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko", Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo, Radojica Petrović, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 15)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: *http://www.ikso.net/eo/.*

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: *redaktanto@edukado.net.*

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983. Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsofia.korody@esperanto.de.*

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la retpaĝon de UEA.*

TEJO (http://www.tejo.org/): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Fernando Pita**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Albert Stalin Garrido.**

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Ahmad Reza Mamduhi.** Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters.**

LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): prez. **Nedeljka Ložajić**, *nedeljkalozajic@gmail.com*.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE *(Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo)* Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**.

FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj)*

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro.**

Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Alessandra Madella,** *a.madella@tiscali.it*, **Didier Janot,** *didier.janot@gmail.com,* **Emmanuel Desbrières** kaj **Maximiliano Garcia**.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 25 € en A-landoj kaj 12,50 € en B-landoj, kun ricevo de 4 paperaj kaj bitaj numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al la reta versio de IPR membreco kostas 12,50 € por la A-landoj kaj 6,25 € por la B-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €. Abono de JA papera (kune kun la bita) kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA bita kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. **Lando-kategorioj: B-landoj**: iamaj

socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko, Ameriko (escepte de Usono kaj Kanado), Kiribati, Papuo-Nov-Gvineo, Solomonoj, Vanuatuo en Oceanio. **A-landoj**: ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al **Karine ARAKELJAN**, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, *ilei.kasisto@gmail.com*. Bv klare indiki la celon de via pago.
La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de via sekciestro aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:
a) Pagoj al la sekciestro alvenos al ILEI kune kun tiuj de la aliaj membroj de la sekcio. Vi jam estos en la sekcia listo kaj ne devos mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon.
b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Se vi ne mem posedas UEA-konton, por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Se vi ne estas en la sekcia listo, bonvolu mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon (aliĝilo: https://www.ilei.info/Aligxilo.pdf; abon-formularo por *Juna Amiko*: https://www.ilei.info/Juna_Amiko.pdf). Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al la ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.
* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub la numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).
* Retpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Torhoutsesteenweg 453/0003, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario, jozefo.nemeth@gmail.com*, tel*: (+36-70) 931-0530*. Peranto de ILEI kadre de LIBE: Olena Poshivana, *olenaposivana@gmail.com*.
La adreso de nia nova arkivo: https://www.ilei.info/revuoj/ipr-arkivo.php.
Ni fermis la nunan numeron la 15-an de aŭgusto 2024,
redaktofino por la sekva numero: la 31-an de oktobro 2024.




LONDON UK